

& Je ŝia nomfesto:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 630 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Julio Mangada Rosenörn (Versaĵaro, Madrid 1922). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por & Adiaŭa vorto de la reĝino.>

(#Melodio:

(#: <:35 > (/LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a (#Rekantaĵe: mi3re doTi rere mi; mi3re doTi rere mi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a a;)

)×18)+

(&Strofoj:

'1 "Ne forgesu la nomfeston ; Mian. Certe vi komprenos ; Mi deziras ; jes, vi venos ; Mi esperas la ĉeeston."

(×:; **Bonan aŭdu nun rakonton ; Sonu laŭde kun la fonto ; Plankon paŝe, drume draŝe ; Estu interhoma ponto.**)

'2 Tagon tiel leterdiris ; Vi al mi. Mi ne forgesis ; Koron mian dir' karesis ; Kaj profunde mi sopiris.

'3 Estis dolĉa la ĉeesto : ; Mi tutkore vin gratulis ; Sento mian koron lulis ; Dum la nia apudesto.

'4 Tiun senton por esprimi ; Mi decidis tujan agon ; Ho, la feliĉegan tagon ! ; Jes, antaŭen ! Kial timi ?

'5 En vendejo tuj mi mendis ; Korbon da tre belkoloraj ; Floroj ; kun esprimoj koraj ; Ilin al vi mi jam sendis.

'6 Ĉu vi sentis la kontenton ; Pro la faro, mi ne scias ; Sed mi tamen opinias ; Ke vi ĝuis la prezenton.

'7 Nur estimo via restas ; Al mi9 ; estas ĝi sufiĉa ; Al la koro sentoriĉa ; Tiel, kiel mia estas !

'8 La feliĉaj tagoj pasis ! ; ju pli dolĉa la kunesto ; Des pli mala la foresto ; En doloron ĝi min lasis !

'9 Des pli granda la doloro ! ; Senton devas mi sufoki ; Min ne devas vin alvoki ; Spite de dezir' de l' koro ;

'10 Se mi estus ja kuraĝa ; Povus ion mi vin sendi ; Sed vi rajtus prave plendi ; Se mi estus, do, malsaĝa.

'11 Nu, malgaja mi min sentas ; Pro situacio mia ; tamen, tre korambicia ; sento minsenĉese tentas ;

'12 Min instigas al la ago ; ; kiun vi tuj malpermesis ; ; Kiam senton mi konfesis ; Ha, neforgesebla tago !,

'13 Ne esperu, ne, la ĉpenton ; Kvankam akra la doloro ; ; Ne sufokos mia koro ; Sian grandan puran senton... ..

'14 Kion sendi, do, hodiaŭ ? ; Nu ; "Feliĉojn" nur mi diras ; ; Dum la kor' dolorsopiras ; ; ĉar vi diris ja "Adiaŭ" !

'15 Venu via la admono ; ; Mi trankvile ĝin atendos ; Kvankam vi certege plendos... ; Ankaŭ venos la pardono !

'16 Ĉar vi estas grandanima ; Vi ha ! devas do kompreni... ; Mi ne povas min deteni ; ; Pro la mia sent' senlima !

'17 Sed, jes, havas mi detenon ; ; Mian koron eĉ oferi ; ; Kaj ne plu al ĝi toleri ; Rompi ĝian la katenon.

'18 Tre malgajaj la sopiroj ; Estas de la koro mia ! ; Brunulin' tre simpatia ; ; Tiaj ankaŭ miaj diroj !... ..)